Lifelong Learning Programme

# Katalin Kováts: Metodikaj konsiloj

## por la reta kurso

## *"Kultura diverseco kaj multlingvismo de Eŭropo - kiel lerni pri ili?"*

## de la KLERIGEJO

## ĉe **www.edukado.net**

## Realigita kadre de la Grundtvig-projekto

2013-1-PL1-GRU06-38757

## Cultural diversity and multilingualism of Europe - how to learn about it?

*Europe's cultural diversity and multilingualism – how to learn about it?* is a Grundtvig project, in which four organisations participated, they are as follows:

*Centre for Intercultural Education (CEM) (Poland – Nowy Sącz),*
*Foundation edukado.net (Netherlands - Hague)*
*German Esperanto Association for education and culture (Germany -Herzberg am Harz)*
*Cultural Esperanto Association (KEA) (Hungary – Budapest).*

From 2013 to 2015 the project kindly supported these organisations, who aimed to present to each other their culture and some of its qualities and cultural resources.
During hospitality exchanges the delegates took part in cultural programmes, lectures and seminars. They visited museums and exhibitions; they enjoyed superlative theatrical performances by dance companies dance and concerts given by folk-music ensembles. They also relished typical regional dishes, tasted wine etc.

During the gatherings these programmes were not only entertaining, they were also educational and enlightening.

They expanded the participants' knowledge about various disciplines: mainly about geography, linguistics, folklore, folk music, ethnography, history, gastronomy and it enabled them to take part in practical activities such as dancing, embroidery and most important of all practice in speaking their common language, Esperanto. The possibility of unimpeded communication between the Dutch, Polish, German and Hungarian participants whether during lectures and educational programmes or during social intercourse was an incalculably valuable element in the project.
One often says that the events and experiences that occur in our lives are *unforgettable*. However knowing human nature, it is necessary and worthwhile to create means to preserve the things that have been learnt, not only in the hearts and minds, but also by using modern technology, in more reliable and enduring forms.
In this way the acquired knowledge and information will still be available after the end of the project both for the participants and the general public.
We used two techniques to preserve the materials. We tried as far as possible to record or film the lectures, events and cultural activities. We then chose the best tapes and videos, which we edited and published in publicly accessible channels such as YouTube or edukado.net.

With regard to the specific cultural topics presented by each of the partner countries we prepared courses using appropriate articles and texts to which we often added supplementary materials such as tapes, music, films etc. These lessons are arranged in consecutive order and provide complete course materials.
This pamphlet aims to give some methodological and didactic guidelines about how best to use this collection of valuable materials.

## ENHAVO


**I. ENKONDUKO** ........ **4**

**II. PRISKRIBO DE LA RETA KURSO** ........ **5**

II.1 KLERIGEJO, TIES FUNKCIADO ........ 5
II. 2 AL KIUJ NI KONSILAS UZI LA MATERIALOJN? ........ 5
II. 3. 1 AĜO KAJ LINGVONIVELO DE LA KURSANOJ ........ 6
II. 3.2 LABORFORMOJ ........ 6
II. 3. 3 TEMOJ ........ 6
II. 3. 4 EDUKAJ VALOROJ KAJ EBLOJ DE LA KURSMATERIALO ........ 7
II. 3. 5 LINGVOUZAJ LERTOJ ........ 7

**III. KOMPRENIGO DE TEKSTOJ** ........ **8**

III. 1 MOZAIKOJ ........ 8
III. 2 TEKSTOJ KUN TRUOJ ........ 8
III. 3 KAPTU LA LASTAN VORTON ........ 9
III. 4 TROVU LA ILUSTRAĴOJN ........ 9
III. 5 KLAĈO-ĈENO ........ 9
III. 6 RETAJ TESTOJ EN LA KLERIGEJO ........ 11
III. 7 PLURSENCAJ INFORMOJ ........ 11

**IV. EKZERCOJ BAZE DE LA FILMOJ** ........ **12**

IV. 1 PREPARO ANTAŬ LA FILMOJ ........ 12
IV. 2 SERĈU RESPONDOJN AL LA DEMANDOJ ........ 12
IV. 3 SERĈU KONKRETAJN INFORMOJN ........ 13
IV. 4 DUBLIGADO DE FILMOJ ........ 13

**V. PRILABORADO DE LA LEKSIKO** ........ **14**

V. 1 LA CERBOŜTORMOJ ........ 14
V. 2 VORT-KARTOJ ........ 14
V. 3 MEMORI-LUDOJ ........ 15
V. 4 VORTOJ KAJ DIFINOJ ........ 16
V. 5 TROVU LA SINONIMOJN! ........ 18

**VI. EVOLUIGO DE LA SKRIBAJ LERTOJ** ........ **19**

VI. 1 SIMPLIGO DE TEKSTOJ ........ 19
VI. 2 RESUMO DE TEKSTOJ ........ 20
VI. 3 RAPORTOJ, ARTIKOLOJ ........ 20

**VII. PAROLIGAJ AKTIVAĴOJ** ........ **21**

VII. 1 AKTIVAĴOJ POR LA EVOLUIGO DE LA MONOLOGA PAROLADO ........ 21
VII. 1. 1 PAROLIGO PRI BILDOJ ........ 21
VII. 1. 2 PAROLU LONGE, SED DIRU MALMULTON! ........ 23
VII.1. 3 INTERPRETADO ........ 24
VII. 1. 4 MAGNETOFONO ........ 24
VII. 1. 5 PREZENTO ........ 25
VII. 2 AKTIVAĴOJ POR LA EVOLUIGO DE LA INTERAGA PAROLADO ........ 25
VII. 2. 1 SURDULO ........ 25
VII. 2. 2 MENSOGULO ........ 27
VII. 2. 3 INTERPRETADO ........ 27
VII. 2. 4 DISKUTOJ ........ 27
VII. 2. 5 ROLLUDOJ ........ 29
VII. 2. 6 TASKO-SOLVADO ........ 32

# I. Enkonduko

*“Kultura diverseco kaj multlingvismo de Eŭropo - kiel lerni pri ili?”* estas Grundtvig-projekto kun la partopreno de la kvar organizaĵoj:

- Centro de Interkultura Edukado (CEM) (Pollando – Nowy Sącz),
- Fondaĵo edukado.net (Nederlando-Hago),
- Filio de Germana Esperanto-Asocio por Klerigado kaj Kulturo (Germanio-Herzberg am Harz kaj
- Kultura Esperanto-Asocio (KEA) (Hungario-Budapeŝto).

Inter la jaroj 2013 kaj 2015 danke al la projekto la partoprenantaj organizaĵoj celis prezenti unu al la aliaj sian kulturon, kelkajn el ties ecoj kaj valoraĵoj.

Dum la reciprokaj gastigoj kaj vizitoj la membroj de la vojaĝantaj delegacioj partoprenis kulturajn programojn, prelegojn, seminariojn, vizitis muzeojn, ekspoziciojn, ĝuis altnivelajn teatrajn prezentaĵojn de dancgrupoj, koncertojn de folkloraj muzikensembloj, frandis tipajn manĝaĵojn de la regionoj, gustumis vinojn… kaj tiel plu.

Dum la renkontiĝoj tiuj programoj estis ne nur amuzaj, sed ankaŭ klerigaj kaj spertigaj.

Ili vastigis la konojn de la ĉeestantoj en diversaj kampoj ĉefe pri geografio, lingvistiko, folkloro, popolmuziko, etnografio, historio, gastronomio kaj ebligis praktikajn aktivaĵojn kiel dancadon, brodadon kaj plej grave aplikadon de komuna lingvo, Esperanto. La eblo je senĝena interkomunikado inter la nederlandaj, polaj, germanaj kaj hungaraj partoprenantoj ĉu en okazoj de prelegoj, klerigaj programoj, ĉu dum la kune pasigita tempo, estis netakseble valora elemento de la projekto.

Oni ofte diras, ke la travivitaj eventoj kaj spertoj estis *neforgeseblaj*, tamen konante la homajn ecojn, necesas kaj valoras krei rimedojn por konservi la lernitaĵojn ne nur en la koroj kaj cerboj, sed helpe de la modernaj teknikaĵoj, ankaŭ en pli fidindaj kaj temporezistaj formoj.

Tiel la akiritaj konoj kaj informoj restos kiam ajn ankaŭ post la projektoperiodo konsulteblaj, kaj por la partoprenintoj kaj por la ekstera publiko.

Por konservi la materialojn ni uzis du teknikojn. Ni klopodis laŭeble registri la prezentojn, tiel naskiĝis sondosieroj aŭ filmitaj materialoj pri la prelegoj, programoj, kulturaj aranĝoj.

El tiuj registraĵoj ni elektis la plej bonajn, redaktis ilin, kaj aperigis la materialojn en publike alireblaj kanaloj kiel YouTube aŭ ĉe edukado.net.


Pri la specifaj kulturaj temo de la partnerlandoj pretiĝis kursoj kun laŭtemaj artikoloj kaj tekstoj, al kiuj ofte aldoniĝis kompletigaj materialoj kiel sondosieroj, muziko, filmoj, k.s. Tiuj lecionoj estas vicigitaj kaj formas kompletajn kursmaterialojn.

Ĉi tiu broŝuro celas doni kelkajn metodikajn kaj didaktikajn konsilojn pri tio, kiel plej bone uzi la kunigitajn valorajn materialojn.

## II. Priskribo de la reta kurso

### II.1 KLERIGEJO, ties funkciado

Ni lokis la kursmaterialojn al la KLERIGEJO de [www.edukado.net](http://www.edukado.net). Tiu loko estas reta malferma universitato kun pluraj senpagaj kaj kelkaj pagendaj kursoj, pri Esperanto aŭ pri ajna temo, en la internacia lingvo.




La kvar kursoj, kreitaj kadre de nia Grudtvig-projekto, ricevas apartan studspacon en la KLERIGEJO, kiun ajna persono (post registriĝo en la paĝaro) povas atingi kaj laŭdezire ekstudi je ajna ĉapitro de ajna kurso de la studspaco.

Post la elŝuto de la unuopaj lecionoj la kursano havas eblon trapasi ankaŭ teston, kadre de kiu li aŭ ŝi ricevas laŭhazarde elektitajn 10 demandojn, kie el 3-4 elektebloj necesas trafi la ĝustan solvon.

La sukcesnivelo estas 70 procentoj.

Kiam la kursanoj sukcesas atingi tion, en lia programskalo verdiĝas la koncerna skatolo. Alikaze tiu ruĝiĝas. La testoj ripeteblas kiom ajn fojojn (eĉ se ilin oni solvis je 100 %a sukceso) kaj el la rezultoj konserviĝas nur la plej bona. Tiu tekniko stimulas la kursanojn re- kaj refari la testojn, ĝis ili atingas la maksimumon kaj dume ankaŭ senkonscie ili tra- kaj trairas la temon.

### II. 2 Al kiuj ni konsilas uzi la materialojn?

La kursmaterialo, kiun ni produktis danke al la Grundtvig-projekto disponeblas do al ĉiuj partoprenintoj de la projekto kaj al ajnaj interesiĝantoj, kiuj en formo de memlernado povas kleriĝi.

Alia uzeblo estas trastudi la materialon kadre de kursprogramoj, ĉu en instituciaj formoj, eĉ lernejaj, ĉu en movadaj, hobiaj rondoj.

Ĉar la membroj de [www.edukado.net](http://www.edukado.net) estas plejparte instruistoj aŭ kursgvidantoj, la uzeblo de la kursmaterialo multobliĝas kaj danke al la membroj, devenantaj el 125 landoj, ĝi povas atingi ajnan publikon en la mondo.

### II. 3. 1 Aĝo kaj lingvonivelo de la kursanoj

La tekstoj de la lecionoj estas altnivelaj, kompleksaj kaj enhave kaj lingve. Lingvonivelo de la uzantoj estu minimume B2, aĝo pli ol 14 jaroj.

Por uzantoj pli junaj aŭ lingve malpli spertaj eblas lingve kaj enhave simpligi la materialojn aŭ /kaj krei specialajn taskojn.

La partneroj de la projekto la ellaboradon de tiaj materialoj planas efektivigi en la postprojekta fazo, depende de la intereso aŭ peto de la kursgvidantoj kaj uzantoj. Ni forte kalkulas ankaŭ je tiucelaj kontribuaĵoj flanke de la uzantoj kaj pretos publikigi novajn rilatajn taskojn, testojn kaj eĉ tekstojn.

### II. 3.2 Laborformoj

Studo de la kompletaj kursoj

La kurso taŭgas kiel kompleta materialo kaj prilaboreblas de paŝo al paŝo laŭ la temoj, en sinsekvo de semajnoj aŭ renkontiĝoj, kaze ke la celgrupo decidas aŭ bezonas tiom profundajn kaj vastajn etnografiajn konojn pri iu teritorio (ekkoni Frislandon, sudpolajn popolojn, ktp.)

Studo de unuopaj materialoj

Alia, pli verŝajna, eblo estas prilabori unuopajn lecionojn laŭ la aktualeco de iu temo (ekz. kristnaskaj kutimoj, tipaj etnaj manĝaĵoj, popolaj kostumoj kaj vestaĵoj) aŭ laŭ la intereso de la kursanoj.

Teknike la reta programo ebligas ajnan saltadon inter la lecionoj de iu kurso, eĉ paralelajn studadojn de ajnaj kursmaterialoj.

### II. 3. 3 Temoj

La kursmaterialoj devenas el kvar landoj, pli precize el iliaj konkretaj partoj. Ni havas lecionojn pri Frislando (norda parto de Nederlando), Pollando, Hungario kaj Germanio.

La konkretaj leksikaj temoj estas:

*kristnasko, novjaroj festoj, kolendumado, popoldancoj, popolvestaĵoj, gastronomio (tipaj pladoj, tipaj festaj pladoj), vino, vinproduktado, historio, sporto, bestoj, muziko, festaj kantoj, manlaboraĵoj, brodado.*

### II. 3. 4 Edukaj valoroj kaj ebloj de la kursmaterialo

Kadre de la projekto la partoprenantaj partneroj organizis kaj prezentis dekojn da okazoj por klerigado pri diverseco kaj multlingvismo. Multajn flankojn de tiu bunteco respegulas ankaŭ la kursmaterialoj. Kvankam la programtemoj de la diverslandaj renkontiĝoj ne estis ĉiam la samaj, estis neeviteble, ke lernante pri fenomenoj en unu lando, la aliaj partneroj faru komparojn, pensu pri la samaj fenomenoj de siaj lando kaj kulturo, kaj klarigu tiujn al la aliaj partneroj.

La projektprogramoj donis okazon por multaj tiaj renkontiĝoj kaj konfrontiĝoj, kaj la samo okazos ankaŭ en tiuj kursanoj, kiuj post la projekto dise en la mondo prilaboros la kursmaterialon. Spektante filmon pri popoldancoj aŭ popolvestaĵoj nature doniĝas eblo kompari la viditajn dancojn kaj vestaĵojn kun la propralandaj. Legado pri tipaj pladoj kaj receptoj de la projektolandoj kreas okazon por lernado kaj provado de novaj aferoj kaj instruado de propraj receptoj kaj kutimoj.

La plej grava pedagogia konsilo estas, ke traktante kiun ajn temon de niaj materialoj ekestu la natura ago de kompreno kaj komparo de ĉio lernita kun la propraj.

Tiuj konsciiĝoj gvidu al diskutoj, starigo de demandoj, esploradoj kaj kleriĝo.

### II. 3. 5 Lingvouzaj lertoj

Oni lernas fremdan lingvon ne por la lingvo mem, sed por ke pere de tiu lingvo oni akiru informojn, kiujn oni malfacile povus aŭ tute ne povus akiri pere de alia aŭ propra lingvo. Dum la projekto la lingvo Esperanto perfekte rolis kiel perilo, simpligante inter la partneroj la komunikadon kaj interkompreniĝon.

En tiu ĉi broŝuro ni rigardas pere de kiuj aktivaĵoj eblas bone kombini la lernadon de novaj informoj pri kulturo unu de la aliaj kun la pluperfektigo de la lingvolertoj. Ni montras ekzemplojn pri la evoluigo de la kompreno de aŭditaj kaj legitaj tekstoj, riĉigo de vortprovizo, evoluigo de la parollertoj, tradukkapabloj kaj kreo de situacioj, en kiuj la altnivela produktiva uzo de la lingvo ricevas terenon kadre de la projektotemoj.

## III. Komprenigo de tekstoj

Prilaborado de la tekstoj estas grava aktivaĵo por evoluigo de la komprenkapabloj.

La tekstoj de niaj kursmaterialoj estas ĉiam rice ilustritaj kun la longo de 3 ĝis 6 paĝoj. Tio signifas, ke ilia prilaborado okazu en pluraj paŝoj, dum pluraj renkontiĝoj kaj neniam ene de unu leciono.

Kiam oni legigas la artikolojn antaŭ la kurso, por posta dumkursa pridiskutado eblas faciligi la komprenon per

- kreado kaj disponigo de vortolistoj
- aldono de demandoj por kontroli la komprenon

Kiam oni prilaboras la tekstojn dum la renkontiĝoj, ni konsilas neniam laŭtlegi aŭ legigi je unu spiro la tutan tekston de unu leciono. Helpo per antaŭe preparita vortolisto aŭ listo de demandoj multe utilas. Uzigu al la kursanoj markilojn, per kiuj ili ĉiam kolorigu la esprimojn, kiujn ili ne konas, aŭ trovas gravaj, interesaj.

### III. 1 Mozaikoj

Dispecigu la tekstojn je logikaj partoj kaj disdonu la slipetojn al la kursanoj. Ili legu en si mem la enhavon kaj poste laŭvice prezentu la legitaĵojn al la aliaj per posta komento kaj kompletigo.

### III. 2 Tekstoj kun truoj

Disponigu la tekston kun truo kaj aldonu liston de la mankantaj vortoj. Oni laboru en grupoj de minimum 2, maksimume 4 personoj por kompletigi la tuton aŭ parton de la teksto. La kontrolo okazu en plena platformo.

| |
|---|
| **Tasko: Kompletigu la tekston elektante la ĝustan vorton el la suba listo.** |
| ekipiĝis, forlasiĝis, komencis, konstrui, larĝis, longis, konkurenci, malaperis, navigis, utilis, protekti. |
| La tradiciaj frisaj velŝipoj nomiĝas 'skûtsjes'. Tiujn ŝipojn oni ______________ kaj uzis ekde la 18a jarcento ĝis la jaroj 1930. Ili ___________ inter 12 kaj 20 metrojn, kaj averaĝe ______________ 3,5 metrojn. Dum la dudekaj kaj tridekaj jaroj de la pasinta jarcento, oni ______________ ekipi ilin per motoro, sed estas nur post la dua mondmilito ke la veloj komplete ______________, almenaŭ por la transporta laboro. La skûtsjes ______________ kiam la kanalŝipoj komencis estis tiom grandaj kaj ekipitaj de tiom fortaj motoroj ke ilin ______________ ne plu eblis. Dum la kvindekaj jaroj, multaj el tiuj ŝipoj, kiuj tiam ______________ kiel surakvaj loĝejoj, denove ______________ per mastoj kaj veloj kaj denove ______________ , ĉu fare de privataj ŝatantoj, ĉu de organizaĵoj celante ______________ tiun kulturan heredaĵon. |

La mankantaj vortoj povas esti hazarde miksitaj, sed povas elektiĝi laŭ iu gramatika koncepto. Ekzemple manku substantivoj, verboj, adjektivoj aŭ partoj de esprimoj.

### III. 3 Kaptu la lastan vorton


La tekston eblas ankaŭ en luda formo laŭtlegigi. Dispecigu ĝin en relative malgrandajn partojn, ili ampleksu maksimume 5-10 liniojn. Antaŭ ol tranĉi ĝin je pecoj aldonu al ĉiu sekva parto la finajn kelkajn vortojn de la antaŭa bloko. Poste tranĉu la tekstojn kaj dum la leciono disdonu ilin miksitaj. Depende de la nombro de la grupo unu persono povas ricevi plurajn tekstpartojn.
La unua persono legas la tekston kaj ĉiu atentas por kapti la lastajn vortojn. Se iu havas tiujn sur sia slipeto, li aŭ ŝi povas daŭrigi la legadon.

### III. 4 Trovu la ilustraĵojn

Ĉiu teksto estas riĉe ilustrita. Vi povas elpreni la ilustraĵojn kaj projekcii ilin kune, indikante la bildojn per literoj aŭ ciferoj, sed ne en la vicordo de la apero en la teksto.
Dum la legado de la partoj oni observu la ilustraĵojn kaj indiku kiam oni rekonis iun bildon laŭ la tekstenhavo.

### III. 5 Klaĉo-ĉeno

Eble la ekzerco ŝajnas iom komplika, sed se la gvidanto bone komprenas kaj reĝisoras, ĝi estos tre amuza aktivaĵo.
Necesas dividi la kursanojn je 2 aŭ 4 grupetoj, konsistantaj el 2-4 personoj.
Elektu el la teksto unu aŭ du interesajn partojn. Kun 4 grupetoj agu laŭ la sekvaj instrukcioj.
**Unua paŝo:** Donu la tekston nr. 1 al la grupo nr. 1, la tekston nr. 2 al la grupo nr. 3.
Lasu al ili tempon por legi sian parton.
Dume por la grupoj nr. 2 kaj 4 indiku la temon de la teksto kiun ili baldaŭ aŭdos de la grupo ĵus antaŭ ili en la cirklo. (Grupo nr. 2 sciu la temon de la artikolo de la grupo nr. 1, kaj grupo nr. 4 sciu tiun de la teksto de la grupo nr. 3.)
Dum la senparaj grupoj legas sian parton, la paraj grupoj provu diveni la vortojn, esprimojn rilate la temojn.
La grupoj sidiĝu je laŭeble plej granda distanco unu de la alia por ke ili ne ĝenu la aliajn grupojn per sia parolado.




**Dua paŝo**:

Post la legado de la tekstopartoj la senparaj grupoj paralele rakontu al la sekva grupo senpapere la enhavon de sia parto. (Nr. 1 al nr. 2, nr. 3 al nr. 4.)


La membroj de la aŭskultanta grupo povas fari notojn.




**Tria paŝo:**

La ĵus aŭskultintaj grupoj nun plurakontas la novaĵojn al la sekva grupo: nr. 2 al nr 3, nr. 4 al nr. 1.

La aŭskultantoj denove povas fari notojn.




**Kvara paŝo:**

Grupo nr. 3 rakontas publike al ĉiuj kion ili aŭdis. Kiam ili finis, la du antaŭaj grupoj povas komenti aŭ korekti la informojn.

Eblas nombri la bonajn informojn: "Vi diris/komprenis ĝuste ke …. ..". "Vi miskomprenis, misdiris, ke…"

Kiam tiu grupo finis, grupo nr. 1 rakontas la tekston de grupo 3. Kaj la aliaj grupoj taksas la kolektitajn informojn.

En la aktivaĵo ĉiuj grupoj kaj legas kaj rakontas, sed nur du grupoj rakontas publike: nr. 3 kaj nr 1. Oni povas ripeti la aktivaĵon alifoje atentante, ke la unuan paŝon faru la grupoj, kiuj je la unua aktivaĵo ne rakontis en la fina paŝo, do, en nia ekzemplo grupoj nr. 2 kaj 4 komencos la unuan legadon.

La metodika gajno de la aktivaĵo estas, ke la grupanoj plurfoje trairas la tekston, atentas detalojn kaj tiel alproprigas la informojn en luda maniero.

### III. 6 Retaj testoj en la KLERIGEJO

Kontrolmaniero de la kompreno povas esti ankaŭ la reta aplikaĵo en la KLERIGEJO de edukado.net kiel en reta kontakto solveblas testoj kun 10 demandoj, respondendaj per elekto de la ĝusta respondo en difinita tempo.

Oni povas solvi la teston individue aŭ grupe sub la konto de unu kursano.




### III. 7 Plursencaj informoj

En kazo, kiam al la tekstoj apartenas sondosiero aŭ filmparto, eblas kaj legigi kaj vidigi/aŭdigi la materialojn kaj poste serĉi la diferencon en la informoj.

Tiu ekzerco perfekte taŭgas por fiksi la ofte misuzatan esprimon kun la verbo MANKAS.

| |
|---|
| En la filmo MANKIS la informo (sen akuzativo!!!!) pri ….. |

# IV. Ekzercoj baze de la filmoj

Por la diversaj lecionoj de la kursoj ofte aldoniĝas filmoj, aŭ kiel nuraj materialoj kaj informfontoj aŭ kiel akompanaĵoj al la tekstoj.

Tiuj filmoj aŭ aŭdimaterialoj estis registritaj dum la renkontiĝoj de la projekto.

Spektado de la filmoj ne estu simple rigardado, sed la kursanoj ĉiam havu kelkajn konkretajn taskojn, kiuj stimulas ilin al pli atenta observado kaj lernado.

En la subaj punktoj ni sugestas aktivaĵojn por evoluigi la komprenkapablojn de aŭditaj kaj filme viditaj informoj.

## IV. 1 Preparo antaŭ la filmoj

Kiel ni jam menciis en la punkto nr. III, la novajn temojn eblas enkonduki tiel, ke la kursgvidanto disponigas vortoliston, klarigas la specifajn vortojn antaŭ la disdono de la nova lecionteksto.

## IV. 2 Serĉu respondojn al la demandoj

Antaŭ la spektigo de la filmoj la kursanoj ricevu mallongan enkondukon kaj liston de demandoj, kies respondojn ili povas trovi en la filmo. Kvankam dum la ekzamenoj ĉe la kontrolo de la aŭskulta kompreno oni neniam povas vidi la demandojn antaŭ la unua aŭdo de la teksto, ni tamen konsilas, ke la kursanoj ekkonu la demandojn antaŭ la spektado de la filmo. Tio necesas, ĉar ĝuste por tio ni konigas la demandojn, por ke la kursanoj estu pli atentaj kaj celkonsciaj dum la spektado.

Pli bonas, kiam la demandoj sekvas la enhavon de la filmo, kaj ne estas miksitaj laŭ la vicordo.

Teorie la demandoj enhave povas enketi pri kompreno de gravaj konceptoj kaj diritaĵoj, sed ankaŭ pri kompreno de malgrandaj detaloj, ciferoj aŭ nomoj.

Ni konsilas ne demandi bagatelajn detalojn, sed koncentriĝi je la gravaj elementoj kaj informoj, ja tio multe pli helpas kaj motivigas la kursanojn. La spektado kaj la ekzerco tamen devas esti ĝuo kaj ne suferigo kaj ekzamenado.


La kontrolo de la kompreno okazu post la filmo en plena grupo kaj fariĝu ankaŭ diskuto, komentado, parolekzerco.

## IV. 3 Serĉu konkretajn informojn

Antaŭ la spektigo de la filmoj ni povas doni diversajn taskojn al la kursanoj. Kelkaj povas serĉi en la filmo ekzemple nomojn de vestaĵoj, geografiajn lokojn kaj konceptojn, aŭ simple noti la vortojn kaj esprimojn, kiujn ili ne komprenis.



Kiu estis la priskribo de la dancpaŝoj en la filmo pri la frisaj vestaĵoj kaj dancoj? Kion rakontis pri sia vestaĵo la frisa virino?



Kiuj estas la tipaj vestaĵoj de la polaj nigraj montaranoj kaj kiujn pecojn kiam oni surhavas? Kion deziras la nigraj montaranoj per la kanto salutante okaze de la nova jaro?

## IV. 4 Dubligado de filmoj

Ĉe filmoj estas tre ŝatata kaj samtempe laboriga aktivaĵo, kiam oni provas dubligi filmojn. La kursanoj spektu la elektitan filmeron kaj faru notojn por si mem. Post 2-3-foja spektado, la gvidanto forprenas la sonon de la filmo kaj lasas la komentadon al la elektitaj kelkaj kursanoj, kiuj laŭvice provas solvi la taskon.

Ĉe filmeroj, kiuj havas sufiĉe emociplenajn dialogojn, ni konsilas provi ekzercon, en kiu vi ne montras la sonon de la filmo, sed ludigas ĝin muta du-tri fojojn kaj lasas ke la kursanoj imagu la okazaĵojn kaj kreu dialogojn. La elektitaj rolantoj povas antaŭe provi inter si ludi la dialogon de la filmo kaj poste prezenti al la tuta grupo. Alia eblo estas improvizi, do, senprove eniri ludon. Tiuokaze la frazoj de unu rolanto estas kompletaj surprizoj por la alia, kiu devas improvize reagi kaj tiel plu. Fine ni kutime vidigas la veran filmon kaj tio estas ĉiam tre amuzaj momentoj.

En la kursfilmoj por tiaj amuzaĵoj apenaŭ estas partoj, sed kun altnivela grupo oni eĉ en niaj filmoj povas trovi taŭgajn pecojn por tiu aktivaĵo.

## V. Prilaborado de la leksiko

La temoj de la lecionoj estas specifaj, ĉefe fakaj, tial ofte okazas, ke la kursanoj renkontas nekonatajn vortojn. Por faciligi la komprenon, estus utile se la kursgvidantoj pretigus vortolistojn kun traduko al la nacia lingvo aŭ eĉ pli valorajn materialojn, nome vortojn kun unulingvaj (Esperanto) klarigoj.

Tiujn listojn oni povas disponigi al la kursanoj aŭ antaŭ ol ili eklegas la tekstojn, aŭ post la legado, depende de la celoj kaj metodo de la kurso.

La alproprigo kaj kontrolo de la scio de la vortoj povas okazi en eksplicitaj kontrolagoj (testoj, ekzamenoj) aŭ en luda formo (konkurigo de grupoj, krucvortenigmoj).

Memoru, ke kaj lernado kaj apliko de "nudaj" vortoj, sen kunteksto, ne multe valoras.

Do, provu instrui la vortojn en esprimoj kaj same okazu ankaŭ la kontrolo.

### V. 1 La cerboŝtormoj

Efika agado estas kiam antaŭ ol ekokupiĝi pri nova temo, la gvidanto lanĉas cerbo-ŝtorman ekzercon, kadre de kiu li indikas la temon kaj petas la kursanojn kolekti tiujn vortojn kaj esprimojn, kiuj povas rilati al la traktota materialo.

Normale tio okazas en la cellingvo, sed oni ofte ebligas listigon de vortoj ankaŭ en la gepatra lingvo, kaj tiam la instruisto aldonas la tradukon de la nova vorto. Kiam li rimarkas, ke la menciita vorto fakte aperos en la legota teksto kaj traktota leciono, li skribas aŭ ekzercigas la vorton, fakte antaŭinstruas, indikante, ke la vorton koni utilos por la kompreno de la nova materialo.


La fulmkolektadon de vortoj oni povas okazigi ankaŭ konkurige, t.e. lasi, ke la grupoj aŭ individuoj en difinita tempo skribe kolektu vortojn. Alia eblo estas alterne demandi de la grupoj po unu vorton. Venkas kiu koletis la plej multajn vortojn aŭ kiu laste diras taŭgan vorton.

Per tiuj ekzercoj la gvidanto preparas la grundon por la novaj informoj, vekas atenton kaj motivigas la kursanojn.

### V. 2 Vort-kartoj

Bona vortlerniga aktivaĵo estas la tiel nomataj vortkartoj (angle flash-cards). Kartoj kun fotoj kaj nomoj de la konceptoj. Oni dismetas la kartojn kun la fotoj supren kaj kun vortoj suben al la tablo. La ludantoj laŭvice prenas karton kies nomon ili scias. La kontrolo eblas pere de la vorto dorsflanke.

Eblas amasigi la kartojn en turoformo kun fotoj supren. Oni devas laŭvice preni karton kaj diri ties nomon, poste oni kontrolas la vorton dorsflanke. Se la persono sciis la vorton, li povas konservi ĉe si la karton. Se ne, la karto devas reiri al la subo de la staplo. La ludo finiĝas kiam ĉiuj kartoj elĉerpiĝis kaj gajnas, kiu havas la plimulton de la kartoj.



Fonto de la fotoj: http://www.perfekt.krakow.pl/stroje/nowy-sacz

## V. 3 Memori-ludoj

Alia aktivaĵo kun kartoj estas la memori-ludo, kiam la kartoj unuflanke havas kaj la nomon kaj la foton kaj la alia flanko de la karto estas ĉe ĉiu peco la sama. Produktu el ĉiu karto du samajn ekzemplerojn.

Kuŝigu la kartojn kun la samaspektaj dorsflankoj al la supro, kaŝante la vortojn kaj la ilustraĵojn. La ludantoj laŭvice prenas unu karton, elparolas la vorton kaj vidigas la ilustraĵon, poste li provas trovi la paron de la karto levante unu alian el la kartoj. Se la persono trafas kaj havas du samajn karton enmane, li povas konservi ilin ĉe si. Se ne, li devas remeti ambaŭ kartojn al ties antaŭaj lokoj.

Kompreneble la ludantoj klopodas memori la kartojn kaj iliajn lokojn. Kiam ludanto sukcesis, li povas levi novan karton kaj daŭrigi la trovadon ĝis li ne plu trafas paron. La sekva ludanto prenas karton kaj same provas trovi ties paron.
Iom post iom ĉiu karto jam montriĝas, kaj havas grandan rolon la memorkapablo. Tiu parto estas grava por la lernado, ĉar oni kune kun la bildo provas fiksi la nomojn de la konceptoj.
Faciligas la ludon kiam oni lokas la kartojn en ordigita vico. Malfacilas kiam tiuj estas lokitaj en kaoso, sen ajna vicigo aŭ figura formo.


## V. 4 Vortoj kaj difinoj

Pli altnivela kaj malfacila aktivaĵo estas, kiam oni devas parigi vortojn kun ties difinoj.
Ni vidu ekzemplon pri la vortostoko, rilata al la lecionoj pri la frisa kaj polaj muzikoj kaj dancoj. El la kartoj valoras produkti du versiojn. La unua stoko estas por lerni la konceptojn, tiam la dekstra kaj la maldekstra parto de la karto restu kune. Por la dua serio distranĉu la parojn, sed por ke la kursanoj povu mem kontroli la ĝustecon de la elektoj, iel marku la kartojn dorsflanke ekzemple per malgrandaj literparoj A-a, B-b, ktp… . Kiam la kursanoj ekzercas sin pri tiuj vortoj, ili vidas nur la ĉefajn partojn de la kartoj, kaj la dorsan flankon rigardu nur por kontrolaj celoj.



akordeono

Muzika instrumento kun balgo kiun oni kunpremas kaj ekspansiigas por produkti sonon per la fluo de aero vibriganta metalajn lamenetojn. La ludantoj kutime regas la aerfluon per pianstila klavaro (sur unu ekstremo) kaj per butonoj (sur la alia), per kiuj oni ludas tonojn.



norda trabo

Tre populara instrumento en Frislando. Ĝi konsistas el ligna sonkesto, sur kiu streĉiĝas 4 aŭ 5 kordoj. Oni ludas la melodion sur la antaŭaj du kordoj. La ceteraj kordoj estas agorditaj kvinte kaj servas kiel bordunoj. Iuj el la instrumentoj estis diatonaj, aliaj estis kromataj. Ofte oni kuŝigis la instrumenton sur tablon por ludi ĝin fingre, eventuale pasigante bastoneton sur la transversaj trabetoj.



polko

Danco en 2/4-takto (ne intermiksu ĝin kun la polonezo!), originis en la mezo de la 19-a jarcento en Bohemio (tiam parto de Aŭstra Imperio, nun la okcidenta parto de Ĉeĥio). Ĝi estas ankoraŭ ofta en ĉeĥa popolmuziko, kaj disvastiĝis en Eŭropo kaj Ameriko. En la klasika muziko, multajn tiajn muzikaĵojn komponis interalie la du Johann Strauss-oj.




mazurko

Pola popoldanco, en 3/4-takto kaj grava motivo de la pola muziko. Ĝi estas opiniata kiel plej poleca danco. Ĝi estas plej malnova pola danco, eble el la malfrua antikva epoko. Ankaŭ la pola himno estas tia dancmuziko.



valco

Turnodanco laŭ tritakta ritmo aŭ muzikaĵo por tia danco.
Famaj estas la rapidaj versioj, precipe en la aŭstria ĉefurbo, Vieno, kaj la melodioj de la komponisto Strauss. La angla versio de tiu danco estas multe malpli rapida, kaj konas pli da figuroj ol la viena speco.



kvadrilo

Soci-danco, kreita je la fino de la 18-a jarcento en Francio. En ĝi du grupoj el po du-tri paroj ĉen-dancas unu kontraŭ la alia. Tiajn dancmuzikojn komponis Johann Strauß (patro), Johann Strauß (filo), Josef Strauß. Oni ofte dancas tiun dancon en la operejo de Vieno.

**La frisa ĉevalo**

('Frysk hynder' en la frisa lingvo, 'Fries paard' /friis paard/en la nederlanda)

Jam la romianoj valorigis ĝiajn kvalitojn kaj volonte uzis ĝin kiel batalĉevalon dum la konkero de Britio. Frisaj ĉevaloj estis verŝajne jam 3000 jarojn antaŭe uzataj de la kamparanoj.
Dum la mezepoko, ili famiĝis – denove kiel militĉevaloj – kaj la 'Okdek jarojn longa milito' (sendependiĝo de Nederlando el la hispana imperio - 1568 – 1621) estis okazo pliriĉigi iliajn genojn per parigado kun hispanaj rasoj, precipe el Andaluzio.
Tamen montriĝas ĉe la frisa ĉevalo la samaj kvalitoj kaj trajtoj, kiuj famigis ĝin en la pasinteco: tutnigra fortika besto kun belegaj ondformaj hararo kaj vosto, inteligenta kapo kun mallongaj, pintaj kaj moviĝemaj oreloj. Ĝia kolhalteco altas ideale 1,60 metrojn.





Tradicie la ĉevalo vivis en farmo, do tiris la plugilon dumsemajne kaj la kariolon (la duradan frisan 'sjees') kun siaj posedantoj dimanĉe. Sed ankaŭ sub la selo montras ĝi grandajn kvalitojn, kiuj farigas ĝin tre ŝatata raso por la dresistoj. Ĝia amikema kaj lojala karaktero amigas ĝin al ĉiuj.
Ekstreme inteligenta, lernema, vigla, ĝi estis elektita por roli en pluraj mondfamaj filmoj, inter aliaj en '*La masko de Zorro*' kaj '*Aleksandro*'. Ĝi eĉ iĝis la dia ĉevalo '*Pegazo*' en '*La kolizio inter Titanoj*'. La fama verkisto Dan Brown elektis ĝin por roli en lia plej freŝdata libro: '*Inferno*'.
Nur por saltado ĝi ne taŭgas. Ne estas ĝia naturo, nek la celo de ĝia dresado.
Sendube ĝi revigas ĉiun, kiu ĝin renkontas. Dum la jaroj 60 de la pasinta jarcento, ĝi estis en danĝero formorti, sed nun, danke al entuziasmaj frisaj bredistoj, ĝi denove konkeras la mondon kaj havas belan estontecon antaŭ si.

## V. 5 Trovu la sinonimojn!

Apliko de la nova leksiko, en produktiva aktivaĵo povas esti la sekva.

Elektu tekston kaj en ĝi 10-12 vortojn, laŭeble gravajn, rilatajn al la ĉeftemo.

Serĉu ties difinon aŭ sinonimojn kaj listigu ilin en tabelo. La tasko estas por la kursanoj trovi la priskribitajn vortojn en la teksto.

***Tasko: Trovu en la teksto la sinonimojn de la sekvaj vortoj. Atentu, ke vi devas indiki la vortojn en la sama vortospeco, en kiu ili estas en la listo.***

| Difino | Vorto el la teksto |
|---|---|
| Instruo de bestoj por iu celo | |
| Persono, kiu reproduktas bestojn por homa uzo | |
| Heredaĵero | |
| Subspecio | |
| Aparato por prepari la teron | |
| Akiro de io per milito kaj perforto | |
| Flugilhava ĉevalo | |
| Fortega kunpuŝiĝo | |
| Finiĝinta per akuta kaj pika ekstermo | |
| La lasta korpoparto malantaŭ la postaj membroj de vertebrulo | |

# VI. Evoluigo de la skribaj lertoj

## VI. 1 Simpligo de tekstoj

En la tempo de la legigaj metodoj, kiam ekestis la unuaj ofteclistoj, oni eldonis multajn simpligitajn literaturajn verkojn. Aŭtentajn verkojn oni mallongigis kaj lingve (gramatike kaj leksike) reduktis por ke la verkoj estu kompreneblaj ankaŭ por la lernantoj de la lingvoj. La longajn frazojn oni dividis je pluraj frazoj, ŝanĝis la kompleksajn verboformojn je simplaj, la participojn esprimis per simplaj verboj, la maloftajn kaj malfacilajn vortojn ŝanĝis je ofteuzataj sinonimoj aŭ oni ĉirkaŭskribis la vortojn per simplaj, konataj vortoj. La tiel kreitaj verkoj ofte havis amason da piednotoj kun klarigoj aŭ tradukoj de konceptoj, taksataj malfacilaj, tamen necesaj por la literaturaĵoj. La simpligo estis ne nur lingva, sed ankaŭ la amplekso malgrandiĝis en tiuj ŝrumpigprocezoj. Flankaj, por la intrigo ne nepraj, rolantoj malaperis kune kun la partoj, kie nur ili aŭ ĉefe ili rolis.

Tiuj intervenoj en la verkoj povas esti ofendaj kaj malestimaj al la aŭtoroj, sed ili estis grandaj helpoj por la lernantoj de la lingvo. Tiuj kiuj pro la malfacileco de la tekstoj perdis la emon entute legi, nun la pedagogie simpligitaj verkoj donis pozitivaj spertojn, la suksesosento kompreni frendlingvan tekston donis grandan motivon por la legantoj.

| **Origina versio** | **Reduktita versio** |
| --- | --- |
| En 1498 duko Albreĥto de Saksio iĝis reĝo super la frisoj, kiuj sekve perdis sian sendependecon. | En 1498 duko Albreĥto de Saksio fariĝis reĝo de la frisoj. Ili ne plu estis sendependaj. |
| Ekde tiam la frisa lingvo pli kaj pli retiriĝis al la kamparo, kaj en la frisaj urboj la nederlanda lingvo pligrandigadis sian influon. Nur malofte oni skribis en la frisa lingvo. | Ekde tiam en la urboj de Frislando la nederlanda lingvo estis la pli ofta kaj forta. La frisan oni ne skribis, nur parolis ĉefe en la kamparo |
| Tio ŝanĝiĝis kiam en 1581 Filipo la Dua estis eksigita kiel monarko de la Sep Unuiĝintaj Provincoj, post longa batalo pri la suvereneco; | En 1581 Filipo la Dua ne plu estis monarko, finiĝis la longa batalo por la memstareco. |
| Frislando iĝis potenca elemento de tiu regno, kun sia propra provincestro (ekde 1584) kaj sia propra akademio (ekde 1585). | Frislando tiam fariĝis grava, havis propra estron (ekde 1584) kaj propran akademion(ekde 1585). |
| De post tiu periodo disvolviĝis forta frisa nacia sento, precipe inter la pli kleraj urbanoj. | Post tiu periodo la frisa nacia sento fariĝis pli forta, precipe inter la intelektuloj de la urboj. |

Similan intervenon eblas fari aŭ farigi al niaj kursmaterialoj. La ampleksajn tekstojn la kursgvidantoj povas redukti kaj krei ilin kompreneblaj kaj ĝueblaj ankaŭ al publiko je unu-du niveloj malpli alta.

La transformadon de tekstoj povas fari ne nur la kursgvidanto, sed tiu ago povas esti ankaŭ bonega hejmtasko por prsogresantaj lernantoj.

## VI. 2 Resumo de tekstoj

> "Pardonu min, ke mi skribas longan leteron,
> mi ne havas tempon skribi mallonge"

La ŝajne anakronisma frazo de Leibnitz resumas grandan veron. Mallonge, koncize, bone srukturite skribi estas pli malfacila tasko ol longe rakonti, detali ĉion, sen apartigi la gravajn informojn de la malgravaj detaloj. Baza elemento de la skribaj ekzamenoj estas tiu taskotipo, ekzemple verkado de letero kun fiksitaj enhavpunktoj, kaj ankaŭ en fiksita nombro de vortoj aŭ linioj.

La kreado de resumo povas esti ne nur parola aktivaĵo, sed ankaŭ skriba.

La diferenco inter resumo kaj simpligo de teksto estas tio, ke ĉe la resumo oni ne celas simpligojn, reduktadon de gramatikaj kaj leksikaj formoj, tie la celo estas kvanta reduktado kaj eligo de la gravaĵoj.

Ni konsilas al la kolegoj farigi resumojn de tekstoj, uzante kiel bazon la lecionojn de nia kursmaterialo.

## VI. 3 Raportoj, artikoloj

Raporto pri eventoj, komunikaĵo de novaĵo al amika aŭ pli vasta rondo estas ĉiam grava elpaŝo. Kvankam oni nuntempe ĉiutage multe skribas, ĉefe danke al la reto, tiuj komunikaĵoj estas ofte kriplaj, mankohavaj, gramatike malĝustaj, plenaj je slangaj vortoj, mallongigoj kaj el tiu vidpunkto ankaŭ nia lingvo, Esperanto, ne estas escepto.

Ekzercigo de verkado de kohera teksto, bone strukturigita, enhave preciza, stile bela, kaj entute komprenebla estu tasko de ĉiu instruanto kaj kursgvidanto. Instigu la kursanojn skribi tagĵurnalon, blogon, leterojn, raportojn kaj artikolojn.

## VII. Paroligaj aktivaĵoj

Dum la projektaj renkontiĝoj la parola interkomunikiĝo estis la dominanta aktivaĵo, la partoprenantoj ne skribe, sed parole intersanĝis informojn, amikiĝis, lernis, amuziĝis.

En la postprojekta vivo de la kursmaterialo la legado fariĝas la emfazita lingva lerto.

Des pli gravas, ke oni trovu interesajn kaj trafajn aktivaĵojn por igi la kursanoj paroli.

Sube ni listigas kelkajn ideojn kaj sugestojn, kiuj povas helpi evoluigi la parolkapablon de la lingvouzantoj.

En la *Memtaksilo* de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) oni distingas du tipojn de parolkapabloj: la *interagan* kaj la *memstaran parolon* ("parolan produktadon").

En la interago la parolanto adaptiĝas al la parolpartnero, demando-respondo-demando estas la instigiloj kaj portas al komunikfluo. Scii kiam, kion kaj kiel diri en antaŭe nekonebla situacio, aldone pri faka temo, postulas altan lingvonivelon.

Por la monologa parolado oni povas prepariĝi, lerni frazojn, tekstojn, enparkerigi informojn kun gramatike ĝustaj parolturnoj. Gravas nur, ke neniu demandu ion ajn, ĉar la malpli lertaj lingvouzantoj en tiuj okazoj perdas la fadenon kaj stumblas en la parolo. Evidente tiu dua estas la pli facila ŝtupo de la "parollertoj", sed ankaŭ ĝin necesas plifortigi, por atingi, ke la antaŭe enparkerigitaj parolturnoj enkonstruiĝu kaj fiksiĝu en la memoron kaj fariĝu bazoj por la postaj spontaneaj komuniksituacioj.

Ni vidu kelkajn ekzercotipojn por ambaŭ tipoj de la lertoj.

### VII. 1 Aktivaĵoj por la evoluigo de la monologa parolado

#### VII. 1. 1 Paroligo pri bildoj

Bildpriskribo povas esti parola kaj ankaŭ skriba aktivaĵo. En la KER-ekzamenoj ni uzas ĝin por la testado de la monologa parolkapablo.

Por la evoluigo de la skribaj kapabloj estas utile uzi bildojn kiel stilmulilojn, ĉar uzante bildojn oni donas ideojn kaj temojn, tamen ekskludante lingvajn komunikaĵojn. Tion oni povas kompreni ankaŭ kiel malfacilaĵojn, sed ankaŭ ĝuste kiel faciligon.

La bildtemoj povas instigi je priskriboj de pejzaĝo, homoj, objektoj, vidaĵoj, aŭ pluraj bildoj en serio ebligas priskribigon de agoj, intrigo k.s. Dum ekzamenoj oni aplikas ambaŭ tipojn de bildoj.

*Sudpolaj naciaj kostumoj*












Por la priskriboj de bildoj ni havas specialajn teknikojn.

Oni povas eliri el la ĉefelemento aŭ centro kaj malproksimiĝi de ĝi dum la priskribo, sed pli facilas la proksimiga priskribo, t.e. unue oni lokas la bildon en situacion, en spacon, en tempon kaj nomas la ĉefrolanton kaj ĉefobjektojn. Poste oni transiras al la detaloj, kaj fine eblas aldoni pensojn, komentojn, dubojn, sume: mencii post la objektivaj informoj ankaŭ la subjektivajn.

Dum la ekzamenoj ni ofte rimarkas, ke la kandidatoj entute ne scias, kion rakonti pri bildoj, kaj evidentiĝis, ke ankaŭ en la gepatra lingvo oni ne scius, kion diri. En tiuj okazoj ne la lingvaj kapabloj mankas, sed la direndaĵoj, la motiveco al komunikado, kies kialo povas fonti ankaŭ el personaj trajtoj. Babilemaj personoj multe pli volonte kaj sukcese priskribas bildojn, situaciojn ol tiuj, kiuj ĝenerale malfote kaj malmulte parolas.

Konkludo: necesas unue ekzercigi al la kursanoj en la gepatra lingvo la priskribadon de bildoj.

Bona artifiko povas esti (kion ni aplikas ankaŭ dum la ekzamenoj), imagigi, ke la aŭskultantoj estas blinduloj kaj tuj evidentas, ke por nevidanto necesas rakonti ankaŭ detalojn pri la bildoj. La kandidatoj en tiuj okazoj komprenas, ke necesas mencii ankaŭ evidentajn aferojn, kion oni ne havus ideon mencii al vidanto.



Alia bona stimulo povas esti prezento de similaj, sed ne samaj bildoj, kiujn oni aŭtomate provas kompari kaj trovante la diferencojn oni sukcesas jam pli facile ekparoli.

### VII. 1. 2 Parolu longe, sed diru malmulton!

Ŝajne denove iu kontraŭdiro. Sed ne…

Tiu ekzerco helpas al la parolantoj konsciiĝi pri la enhavo de siaj diraĵoj. La supre prezentitaj kvar bildoj pri la kostumaj paroj estas bone uzeblaj ankaŭ por tiu ekzerco.

La tasko estas tiel paroli pri sekrete elektita UNU bildo el la du, tri aŭ kvar bildoj, ke la aŭskultantoj kiel eble plej malfrue komprenu, pri kiu el la bildoj temas. Por bone solvi la taskon oni devas rapide kompari la bidlojn, trovi la komunaĵojn kaj esprimi ilin tiel, ke la enhavo ne estu helpa, do, mencii aferojn, kiuj veras pri ĉiu aŭ almenaŭ pri pluraj bildoj.

Kutime ni nombras la frazojn, kiujn la parolanto kapablas eldiri sen esti kaptita.

Atentu, ne permesu uzi la samajn frazojn dufoje, kaj ankaŭ ne lasu la parolanton paŭzi dum la parolado. Tio devos esti kontinua, senpaŭza, relative rapida listigo de gramatike ĝustaj frazoj . Ni provu. Divenu pri kiu el la fotoj mi skribas nun.




*Sur la elektita foto mi vidas viron. Estas tie ankaŭ virino. La viro staras. Ankaŭ la virino staras. Ili estas vestitaj. Ili ne estas nudaj. La viro estas ĉirkaŭ 30-jara. La virino aĝas simile. Ili estas junaj. Ili havas belajn vestaĵojn. Pro tio mi pensas, ke ili estas riĉaj. Li havas partnerinon.*
*La viro surhavas almenaŭ unu blankan veston.*
*Sur lia kapo estas ĉapelo. .........*

### VII.1. 3 Interpretado

La ekzerco ne rilatas al la klasika signifo de interpretado, ja temas ne pri transigo de komunikaĵo de unu lingvo al la alia, sed transigo de skribita teksto al parola formo, akustika produkto. Dividu la tekston en alineojn aŭ je partoj de ĉ. 10-15 linioj, aŭ tiel, ke ĉiu kursano ricevu pli-mapli egale longan tekston. Lasu tempon por ĉiu legi sian parton, eventuale noti la ŝlosilvortojn. Kiam ĉiu pretas, oni flankenmetu la skribitajn tekstojn kaj la kursanoj laŭvice rerakontu la legitaĵojn. Ne necesas rediri ĉiujn detalojn, sed resumi la enhavon.
Gravas, ke ĉiu atentu pri la parolanto, kaj en tiu momento neniu plu rigardu la teskton por pretigi sian parton.
Kontrolu post ĉiu prezento, ĉu la aliaj bone komprenis la enhavon, ĉu ili havas demandon.

### VII. 1. 4 Magnetofono

Same kiel en la antaŭa ekzerco la teskon dividu je partoj, sed nun tiuj partoj estu ne pli ol ĉ. 10 liniojn longaj. Du-tri longaj frazoj sufiĉas, se la ekzerco estas nova aŭ la teksto estas malfacila.
Ĉiu kursano legu **la saman** tekston kaj oni elektu aŭ antaŭ la legado, aŭ post la legado tiun personon, kiu pretos/kapablos rediri la tekston kiel eble plej precize. Dum la redirado de la teksto la aliaj vidu la tekston kaj kontrolu/nombru la mankantajn informojn.
Alia versio povas esti, ke neniu rigardu la tekston kaj la aŭskultantoj laŭmemore kune trovu la mankantajn aŭ malĝustajn informojn. Tiu variaĵo estas pli malfacila, pli laboriga kaj povas rezulti en dialogoj, ĉar eble oni ne same memoras kaj komencas diskuti pri la rezultoj. Kompreneble la kursgvidanto ne traktigu tiel la tutan tekston, sed elektu por tiu ekzerco kelkajn interesajn kaj gravajn partojn.

### VII. 1. 5 Prezento

La tekstoj plej ofte estas kompleksaj kaj longaj, sed dividitaj je internaj temoj, ĉapitroj.

Eblas taski la kursanojn per tio, ke ili hejme prepariĝu pri la tekstoj, kreu veran prezentaĵon baze de ili (eĉ kun bildoj, objektoj, per aparato) kaj prezentu la novan materialon al la tuta grupo. Unu tekston eblas doni ne nur al unu, sed al 2-3 personoj, klare indikante, kiu pri kiu parto respondecos.

Post la prezentoj la gvidanto ĉiam stimulu interparoladon, rakontadon pri propraj spertoj. Tiaĵoj povas mem leviĝi en la grupo, sed se ne, la gvidanto stimulu konversacion pere de rektaj demandoj, opinisondado. Atentu, ne starigi ĈU-demandojn, sed KI-demandojn, prefere KIAL-demandojn, por ke en via demando ne enestu la respondo.

## VII. 2 Aktivaĵoj por la evoluigo de la interaga parolado

### VII. 2. 1 Surdulo



La ŝlosilo de ĉiu interago estas la manko de informoj.

Por akiri la mankantan informon oni devas demandi pri ĝi iun, kaj de la demandito oni atendas respondon. Ofte okazas tamen, ke starigado de demandoj pri teksto, konata por ambaŭ flankoj de la dialogantoj, ŝajnas ne natura situacio, do, oni ne emas fari tion. Por stimuli naturan situacion ni ŝajnigas, ke kelkaj el la grupo estas surdetaj kaj ne aŭdis bone kelkajn vortojn, esprimojn, do, estas nature ke ili redemandas tiujn.

La preparo de la teksto por tiu ekzerco estas iom laboriga. Necesas pretigi du diversajn versiojn de la sama teksto aŭ tekstoparto.

En ambaŭ substreku la saman nombron de esprimoj aŭ vortoj. Tiujn vortojn, kiujn vi substerkas en la teksto A, vi anstataŭigas per truo en la teksto B.

Se eblas faru tiel, ke post truo venu substrekita parto kaj tiel alterne. Ne estu duoblaĵoj, kaj ne estu kaj substreko kaj manko en la sama frazo. Kompreneble ne necesas en ĉiun frazon krei ion. Provu atenti, ke vi marku diversajn vortospecojn, tiel, ke en la demandoj la alia flanko devu uzi diversajn demandvortojn.

Oni povas formi grupojn konsistantajn el 2 aŭ 4 personoj. Grupo A komencas laŭtlegi la tekston, sed la substrekitan parton tre mallaŭte, fakte nur “flustre” diras, vere neaŭdeble.

La alia(j), grupo B, tuj starigas demandon, rilatan al la neaŭdita parto. Se la demando estis bona, leganto de teksto A diras la ĝustan vorton (substrekitan) kaj demandanto B kompletigas sian tekston. En la dua paŝo grupo B daŭrigas la legadon kaj prisilentas sian substrekaĵon.

## Teksto A. Vino kiel kuracilo

"Vinon eblas plejparte konsideri la plej saniga trinkaĵo" - skribis Louis **Pasteur**

Alivorte, estas certe, ke tro da vino ________, sed en ĝusta kvanto kaj kvalito ĝi povas ankaŭ multkampe helpi. Ĝia medicina uzado havas **delongan** tradicion: jam Hippokrates preskribis vinon kontraŭ kapdoloroj, febro kaj digestoproblemoj. La fama Paracelsus trovis vinon efika rimedo kontraŭ venenoj kaj bona desinfektilo de ________ (pli bona ol urino, kiu estis tiam kutime uzata!). La **benediktana** abatino kaj multflanka scienculino Hildegardis el Bingen (i.a. kreintino de ĝajne la plej malnova konata projekto de la internacia lingvo!) rekomendis vinon kontraŭ stomakdoloroj, konstipo kaj pulma malforteco. Laŭlegende vino eĉ helpis la sanktan Roĥ, kiam li en ________ malsaniĝis pro pesto...

## Teksto B. Vino kiel kuracilo

"Vinon eblas plejparte konsideri la plej saniga trinkaĵo"- skribis Louis ________.

Alivorte, estas certe, ke tro da vino **damaĝas,** sed en ĝusta kvanto kaj kvalito ĝi povas ankaŭ multkampe helpi. Ĝia medicina uzado havas ________ tradicion: jam Hippokrates preskribis vinon kontraŭ kapdoloroj, febro kaj digestoproblemoj. La fama Paracelsus trovis vinon efika rimedo kontraŭ venenoj kaj bona desinfektilo de **vundoj** (pli bona ol urino, kiu estis tiam kutime uzata!). La ________ abatino kaj multflanka scienculino Hildegardis el Bingen (i.a. kreintino de ĝajne la plej malnova konata projekto de la internacia lingvo!) rekomendis vinon kontraŭ stomakdoloroj, konstipo kaj pulma malforteco. Laŭlegende vino eĉ helpis la sanktan Roĥ, kiam li en **Italio** malsaniĝis pro pesto...




*La supre prezentita ekzemplo kreiĝis baze de la teksto, trovebla en la leciono:*

Manlibro de vinŝatantoj,

*kurso de la hungara partnergrupo*

*ĉe la KLERIGEJO de www.edukado.net .*

### VII. 2. 2 Mensogulo

Por tiu aktivaĵo la elirbazo povas esti kaj la tekstoj kaj la filmoj aŭ sonregistraĵoj.

Necesas paraj grupoj de partoprenantoj. La grupoj konsistu el 2-4 aŭ 6 personoj. Ĉiuj samtempe legas la tekstojn aŭ spektas, aŭskultas la aliajn informfontojn. Poste unu duono de la paroj provu po-parte rerakonti la akiritajn informojn tiel, ke ili laŭeble la plej multajn elementojn ŝanĝu en la teksto, do, uzu antonimojn, ŝanĝu vortojn kaj esprimojn ene de la sama vortspeco, kaj la signifo estu tute alia.

La aŭskultanta grupo/partnero kiam rimarkas "mensogon" devas signali tion per frapado de la tablo, aplaŭdado, fajfado k.s. kaj devas ĝustigi la informojn. Gravas, ke nek la leganto, nek la aŭskultanto vidu sian tekston, ili laboru laŭ memoro. Oni atingu, ke la partneroj ne nur korektu la eraron, sed ankaŭ argumentu: "*kial la falsa informo ne eblas, kiel ili rimarkis ĝin, kio okazus se la afero estus tiel, kiel la mensogulo diris tion,* ktp, ktp.. (La aktivaĵo tre taŭgas por ekzercigo de la kondicionalo).

Ne forgesu ŝanĝi la rolojn, por ke ĉiu povu esti kaj *mensogulo* kaj *trompito*.

### VII. 2. 3 Interpretado

En la kursmaterialoj de la projektokursoj plurfoje okazas, ke en la son- kaj filmregistraĵo la prezentoj kaj prelegoj okazas en naciaj lingvoj, kiujn sekvas buŝa tradukado al Esperanto. Iom tempoperdiga, tamen ofta kaj natura aktivaĵo estas interpreti la aŭditajn informojn al la nacia lingvo de la kursanoj. Necesas atenti, ke por la interpretado necesas haltigi la aparaton, ĉar atendi, ke lernanto de la lingvo kapablu je sinkroninterpretado, estus ne reala pretendo.

La interpretadon faru ĉiam nur unu elektita persono, sed tiu laboru dum ne tro longa tempo, eble maksimume dum kvin minutoj. Post tiu tempo ŝanĝu lin alia kursano.

### VII. 2. 4 Diskutoj

La lecionoj de la kvar kursoj prezentas popoltradiciojn, vivmanierojn, situacion de etnaj grupoj, turismajn informojn, historiajn kaj politikajn temojn. Ili ĉiuj povas esti bonaj elirpunktoj por diskutoj, spertinterŝanĝoj ne nur ene de la partoprenintaj grupoj, sed ankaŭ inter tiuj kursanoj, kiuj ekster la projekto, eble en tute alia flanko de la mondo, okupiĝas pri la materialo.

Post legado de la indikita fragmento el la leciono pri Frislando kaj frisaj lingvo kaj kulturo certe leviĝas multaj demandoj kaj opinioj.

**La lingvo en la nuntempa Frislando**

*La frisa lingvo en la instruado*

*En la jaro 1907 oni komencis instrui la frisan lingvon post la oficialaj lernejaj horoj. Tiam la frisa lingvo estis akcesora fako.* Ekde de la jaro 1937 estiĝis la ebleco por instruistoj instrui la frisan *lingvon dum la lecionoj pri nederlanda lingvo en la pli altaj lernoklasoj.*



Ekde la jaro 1950 naŭ lernejoj komencis eksperimenti kun du lingvoj. Kvin jarojn poste, la frisa lingvo estis elektebla fako en la elementaj lernejoj, kaj la frisa lingvo fariĝis oficiala instrulingvo. Pro ŝanĝo de la instruleĝo en la jaro 1974, ĉiuj frisaj elementaj lernejoj nun havas frisajn lecionojn, sed nur po unu horon semajne.

Nuntempe en Frislando ekzistas cent elementaj lernejoj kaj vartejoj kie oni parolas nur la frisan lingvon. Tio eblas, ĉar la nederlanda konstitucio *havigas la rajton libere elekti la fakojn de instruado.* La malavantaĝo de ĉi tio estas, ke iuj lernantoj *havas problemojn pri la transiro de la elementa lernejo al la mezgrada instruado.* Tie oni instruas la *studobjektojn ekskluzive en la nederlanda lingvo.* Gravas esplori la rezultojn de instruado ekskluzive *en la indiĝena minoritata lingvo,* ĉar eblas ke la infanoj malsufiĉe evoluigos siajn lingvajn kapablojn!

**Jen kelkaj sugestoj de diskuttemoj.**

- *Kiu(j) estas la ŝtata(j)/oficiala(j) lingvo(j) en via lando?*
- *Kiun juran statuson havas la minoritatoj kaj iliaj lingvoj?*
- *Kie oni povas paroli la minoritatajn lingvojn?*
- *Kie oni povas lerni tiujn lingvojn?*
- *Kiom da procentaĵoj de la landa loĝantaro apartenas al diversaj etnoj kaj minoritatoj en via lando?*
- *En kiu lingvo okazas la instruado en la bazaj lernejoj en la minoritataj vilaĝoj, urboj, teritorioj?*
- *Kial gravas, ke aperu libroj, gazetoj, filmoj, radio- kaj televidelsendaĵoj en la minoritataj lingvoj?*
- *Kiuj estas la manieroj konservi la minoritatajn, ĉefe la formortontajn lingvojn?*




### VII. 2. 5 Rolludoj

La rolludoj estas tre altvaloraj aktivaĵoj en la lingvoinstruado. Ilin ofte aplikas la instruistoj, kiuj laboras laŭ la komunikcentraj metodoj.

Minimuma nombro de kunagantoj estas du, sed eblas eĉ dekojn da personoj aktivigi en tia ludo.

Kadre de iu konkreta temo, la kursgvidanto elpensas aŭ elektas situacion, kie estas pluraj rolantoj kaj ties interesoj estas kontraŭstaraj. Eblas ĉiun kontraŭstarigi al unu persono, sed eblas formi ankaŭ plurajn cirklojn, kiuj depende de problemoj ene de la situacio, staras kelkfoje kune, kelfoje unu kontraŭ la aliaj.

La taskojn oni disdonas en skribita formo. La roluloj konas nur sian rolon, sed ne tiun de la aliaj. La rolojn bonas lotumigi, sed la persono de la ĉefrolanto tre gravas, tial tiun ĝenerale la gvidanto elektas mem por ne endanĝerigi la aktivaĵon.

La kursestro prezentas la ĉefrolanton, indikas la lokon kaj post la startigo de la ludo li restas ekster la grupo, simpla observanto kaj silenta animanto de la aktivaĵo. Kiam la roloj estas bone konstruitaj la ludo komencas vivi sian vivon, kelkfoje eĉ transirante la imagojn kaj intencojn de la lanĉinto.

Gravas, ke dume oni ne korektu la lingvajn erarojn, ĉar ne la lingva ĝusteco gravas en la komunikcentra metodo, sed tio, ke la diskutoj kaj komunikagoj iru senprobleme, flue. Kiam la parolpartneroj komprenas unu la alian, absolute perdas sian gravecon la gramatika korekteco.

Ni nun rigardu ne konkretan rolludon kun pretaj rolkartoj, sed mem la proceduron de la kreado de tiaj aktivaĵoj.

Ni imagu nun situacion, kiu povus okazi en pola vilaĝo, inter la montoj, ĉar ĝuste nun la grupo spektis la filmon pri la nacia grupo de nigraj montaranoj. En la filmo rolis ĉ. 40-jaraj geviroj, en belaj naciaj kostumoj, tutevidente fieraj pri siaj kulturo, tradicioj, muziko. Ni povas imagi, ke ili vivas iom retiriĝantaj de la moderna vivo kaj estas ne tre riĉaj.

Por kontraŭstarigi la vilaĝanojn, ni elpensu iun imageblan situacion, ekzemple alvenon de io nova, moderna, al multaj alloga en la vilaĝo, por kiu oni povos krei lokon se ili rezignas de io grava por ilia tradicio. Ni metu kelkajn ne-indiĝenajn loĝantojn en la vilaĝon, eĉ en gvidajn poziciojn aŭ kun signifa financa potenco.

Ekzemple montriĝu la eblo por la vilaĝanoj kandidatiĝi por profitiga Eŭrop-Unia subvencio por ekfunkciigi aŭ kuracistan domon kun modernaj ekipaĵoj aŭ moderne ekipitan retkafejon kaj bibliotekon. La kondiĉo por ricevi la subvencion estas, ke la vilaĝo disponigu mem la konstruaĵon kaj el la subvencio eblas pagi nur ekipaĵojn kaj personajn fortojn, sed ne konstrulaboron.

Kia bona novaĵo! Sed necesas ankaŭ iu kontraŭa startpunkto. Ekzemple tio, ke la sola taŭge granda kontruaĵo, kiu povus servi por la celoj, ĉu por kuracista domo, ĉu por biblioteka socia domo kaj retkafejo, estas la lernejo de la vilaĝo, kie oni, tutunike en la region, instruas ankoraŭ la dialekton de la vilaĝo kaj funkciigas etan popolvestaĵan ekspozicion.

Nun ni havas la konfliktopunkton, necesas do krei la diversajn grupojn kaj rolantojn, kies interesoj interkruciĝu.

**Vi estas la direktoro**

de la vilaĝa popollernejo, kie lernas 80 infanoj de la vilaĝo. Vi fieras pri tio, ke vi suckesis atingi, ke vi povu instrui la lokan dialekton, kolekti popolvestaĵojn kaj aranĝi ankaŭ etan muzean ĉambron en la lernejo, konservante tiel la tradiciojn. Ankaŭ viaj propraj gefiloj lernas en tiu lernejo. Vi ĉiupreze volas konservi ĝin kaj plu flegi la popolajn tradiciojn.

**Estu du ĉefrolantoj:**

**VILAĜESTRO**, kiu volas kandidatiĝi por la subvencio por riĉigi sian vilaĝon kaj kreskigi sian popularecon antaŭ la novaj elektoj. (Cetere li nur antaŭ kelkaj jaroj venis al la vilaĝo, konstruigis por si belegan domon, sed lernigas siajn infanojn en la urbo.)

**LERNEJESTRO**, ĉiama enloĝanto de multaj generacioj, kiu volas konservi la lernejon, instrui la dialektan lingvon.

La aliaj rolantoj povas esti: gepatroj el la popola tavolo kaj gepatroj el la novriĉa, urba grupo. Junuloj, kiuj ĝuste nun pensas transloĝiĝi al la urbo, sentante sin izolataj kaj malfruantaj en la moderna mondo. Maljunuloj, enloĝantoj, avoj, avinoj de infanoj en la lernejo. Ili ne havas aŭton, multaj el ili malsanas, volas havi kuraciston en la vilaĝo.
Pastro, kiu estas malmoderna, timas la danĝerojn, kiujn la reto kaj amaskomunikiloj povas porti al la vilaĝo. La drinkejestro, kiu delonge ŝatus per sendrata konekto allogi pli da klientoj. Gvidanto de la turisma oficejo, kiu estas interesata havi multajn turistojn.
Eventuale infanoj, ĝis nun loĝantaj kaj lernantaj en la vilaĝo. La nombro kaj la roloj dependas de la grandeco de via grupo.
------
La instruisto devas almenaŭ tiom detale, kiel vi legis supre, priskribi unuope la rolojn sur apartajn slipetojn kaj lasi, ke la rolantoj kun sia historio, decidu, kiel ili agos, por kio ili levas sian voĉon. Eblas ankaŭ doni al ili konkretajn instrukciojn, difini por kio ili DEVAS lukti. Kion subtenu la pastro, kion DEVOS en la ludo voli la maljunulo nr. 1 kaj maljunulo nr. 2. Prefere ankaŭ ili havu kontraŭajn dezirojn.
Kaj poste povas komenciĝi la ludo. La gvidanto malfermas la vilaĝkunvenon, prezentas la vilaĝestron kaj la lernejestron kaj diras, ke ili kunvenis por pridiskuti kaj poste voĉdoni pri la ideo de la vilaĝestro, kiu tuj estas petata prezenti sian ideon.
La cetera vicordo venos de si mem… kondiĉe, ke la rolantoj volonte eniras la situacion.



### VII. 2. 6 Tasko-solvado

Unu el la plej altnivelaj agadoj en lernata lingvo estas krei en ĝi novajn informojn, verkojn, uzi ĝin en ĉiutaga kaj faka komunikado kaj interkomunikado, unuvorte vivi en ĝi kvazaŭ oni uzus sian denaskan lingvon.

Ofte okazas al ni esperantistoj, ke ni simple uzas Esperanton por niaj pormovadaj aŭ aliaj agadoj, sen pensi pri tio, ke ĝi estas por ni lernita aŭ ankoraŭ lernata lingvo.

Dum la *taskosolvado* la fokuso iras al la solvado de problemo, kaj la lingvo estas nur ilo por tio. Kadre de la Grundtvig-projekto ni, la partnerorganizaĵoj, almenaŭ unufoje estis en situacio, kie ni devis plani renkontiĝon en nia lando, gastigi la membrojn de la partneorganziaĵoj, zorgi pri loĝigo, manĝigo, klerigaj kulturaj kaj fakaj programoj, ekskursoj, amuzaĵo, ktp.

Trastudante niajn kursmaterialojn vi povas elekti ajnan landon el la kvar kaj baze de la tekstoj, utiligante aliajn informfontojn, (aldone nepre uzu mapon kaj la reton), vi povas en grupoj organizi 3-4-tagan renkontiĝon, pensante, ke vi devos gastigi 80 personojn.

Imagu tion en Frislando, en Herzberg, la Esperanto-urbo, en Hungario aŭ suda Pollando.

Viaj kursanoj dividu la taskojn inter si, estu respondeculoj pri loĝigo, pri manĝigo, pri la temoj de la seminarioj, invitigu gastojn, planu eksursojn kaj organizu la laborkunsidon, kie ĉiu grupo prezentu sian proponon.

Kaj se ĉio ĉi ŝajnas tro malfacila tasko, ĉar vi ne konas bone la proponitajn landojn, imagu la samon en via propra lando aŭ urbo, kreu la programon kaj invitu nin almenaŭ por virtuala ekskurso kaj partopreno en viaj programoj.

Ni volonte akceptos, eĉ publikigos, turismajn informojn pri via urbo kaj regiono, prezentaĵon pri tradicioj, tipaj vestaĵoj, manĝaĵoj, muziko kaj artaĵoj, monumentoj kaj vidindaĵoj.

> Vi estas invititaj krei plurlecionan kurson laŭ la modeloj kiujn vi povas vidi kaj sperti en la studspaco Grundtvig-seminario en la KLERIGEJO de www.edukado.net.